N-ro 176 aŭtuno 2023 ISSN-1565 3315

# ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo

האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו




BONGUSTA SOMERFINA RENKONTIĜO
DE
ISRAELAJ ESPERANTISTOJ
(vidu la paĝon 18)

ISRAELA ESPERANTISTO № 176 2023

REVUO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO (ELI)

*La redaktoro*
*Mikaelo Lineckij*
*mikaelo@esperanto.org.il*

*La redakta komisiono:*
*Gabi Zeevi*
*Amri Wandel*
*Jehoŝua Tilleman*

*ELI-Prezidanto*
*Jehoŝua Tilleman*

*Poŝta adreso de ELI:* P.O.K. 21132, IL-6121101 Tel-Aviv, Israelo.

Karaj legantoj!

1. Pro serioza plikostiĝo de tipografiaj tarifoj kaj de la sendokostoj, ni estas devigitaj plialtigi la abontarifon ĝis 20 eŭroj.
2. Pri ĉiuj nesubskribitaj tekstoj respondecas la redaktoro.
3. Pri enhavo de la subskribitaj artikoloj respondecas **la aŭtoroj mem!!!**

***Enpaĝigo:***
*Mikaelo Lineckij*
***Retejo:***
***http://esperanto.org.il/ie.html***
***Abontarifo eksterlanda:***
20 eŭroj. Eblas pagi per UEA
al la konto elia-q aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.

RIPETO: Eblas ricevi plen-koloran version de la revuo al sendita de vi elektronika poŝtadreso, kaj tia abono kostos por vi nur 5 €! Via elektronika poŝtadreso atendatas. Kelkaj abonantoj jam uzas tiun servon.

**Enhavo:**

Universala Kongreso en Torino - *Impresoj de A.Wandel* ............ 3
Rezolucio de 108-a Kongreso de UEA ........................................... 7
Gazetara Komuniko de UEA ............................ ...................... 9
Deklaro de ELI - *La estraro*.................................................... 10
Milito inter Israelo kaj Ĥamas - *A.Wandel* .............................. 10
Kongresa Italio - ILEI - *N. Daniljuk* ............................................ 14
Orest Kuzma-Tagoj - *P.Polivoda* ............................................ 15
Parabolo ...................................................................................... 17
Someraj renkontiĝoj - *A.Wandel* ............................................ 17
Interese pri hundoj ....................................................... 19
Vizito al kuracisto ........................................................... 19
Tratempa gasto - *T.Kolomijec* ................................................. 20
Faktoj pri la Morta Maro .................... .................................. 22
LitSupO ...................................................................................... *24*
Letero de la leganto, Israela Kongreso .................................. 28

## PERSONAJ IMPRESOJ de la UNIVERSALA KONGRESO

**Amri WANDEL**

La 108-a Universala Kongreso okazis dum 29.7.-5.8.2023 en la bela norditala urbo Torino. Ĉar mi estis kiel kutime la kunordiganto de la scienca programo, kiu ĉi-foje estis aparte abunda (pli ol 20 prelegoj) kaj prizorgis ankaŭ la teknikan flankon (registri la prelegojn kaj funkciigi la deforan partoprenon per Zoom), mi apenaŭ povis partopreni la ceteran dumtagan programon. Tial tiu ĉi artikolo estas el persona vidpunkto, sed por kompletigi la bildon mi uzas ankaŭ alies impresojn.

Ĉar la nuna UK estis la unua post-pandemia kongreso en Eŭropo, partoprenis ĝin relative multaj. Aliĝis 1319 personoj el 69 landoj, kaj surloke estis pli ol mil, el ili ses israelanoj: Yehuda kun edzino, Enrica, Gila kaj mi kaj nova mezaĝa memlerninto Marko Kan. Plej multaj aliĝis de Francio, kaj poste de Germanio kaj Italio. Elstaris la grupo el Tanzanio, la venontjara kongresa lando.

Sabate la 29-an de julio vespere okazis la kutima Movada Foiro, kie diversaj E-asocioj prezentis sin. Ankaŭ ELI havis tablon, kie mi helpe de Gila kaj Enrica prezentis i.a. la novan duoblan n-ron de "Israela Esperantisto". Alia allogaĵo ĉe la israela tablo estis la arta fotoalbumo pri la Israela Kongreso kaj Postkongreso, verkita de Evgeno. Pluraj partoprenintoj en la Postkongreso venis al la israela tablo por aĉeti siajn antaŭmenditajn ekzemplerojn de la albumo, kaj multaj aliaj kongresanoj trarigardis kaj aprezis ĝin.




Dimanĉe matene okazis la kutima solena malfermo de la kongreso en muzeo proksime de la ĉefa kongresejo, la politeknika altlernejo, kie okazis la ceteraj programeroj. La prezidanto de UEA, Duncan Charters prezentis la novan ĵus elektitan estraron. Kompare kun la estraro de 2019 aldoniĝis du virinoj: Aŭrora Bute el Rumanio, kiu alelektiĝis jam pasintjare kaj Gong Xiaofeng (Arko) el Ĉinio. Fernando Maja el Bra-

zilo kaj mi elektiĝis kiel vicprezidantoj. Novaĵo kompare de la tradicia inaŭguro estis la kontinentaj salutoj – ne plu okazas senfina vico de landaj salutantoj, sed ĉiu kontinento sendas 1-2 salutantojn kiuj dum 2-3 minutoj salutas kaj mencias elstarajn atingojn en la koncernaj Landaj Asocioj. Por MONA (Mezoriento kaj Norda Afriko, kiu havas apartan kontinentan komisonon kaj kontinentan staton, same kiel la geografia divido de UN) salutis Gila, kiu menciis i.a. la landajn kongresojn okazintajn en Irano kaj Israelo.




Dimanĉe posttagmeze komenciĝis la kongresa programo kun la inaŭguro de la Internacia Kongresa Universitato (IKU), konciza prezentado de la prelegantoj far la rektoro Fabricio Pennacchietti, kaj sekvis la du unuaj IKU-prelegoj, pri Kvantuma Teorio (Jacobsen) kaj la Kikonga Lingvaro (Goes). Paralele okazis la unuaj prelegoj pri la kongresa temo “Enmigrado - kunfluo de homaj valoroj” kiun reĝisoris Thomas Borman. Vespere estis bela prezentaĵo de naciaj dancoj kaj muziko kadre de la Nacia Vespero.
Lunde okazis, kiel kutime, la prelegoj de la Kleriga Lundo pri plej diversaj temoj, foje ligitaj al la kongreslando Italio. Posttagmeze okazis du IKU-prelegoj, “Lingva Pejzaĝo” (Labrie) kiu temis pri strat-afiŝoj en plurlingvaj urboj, unu el kiuj estis Jerusalemo, kaj “Novaj esploroj pri ekstertera vivo” (Wandel). Paralele okazis koncertoj de Kim, Kajto kaj de la du bardoj Bronŝtejn kun Handzlik. Estis ankaŭ abundo de aliaj programeroj. Vespere estis la kutimaj bankedo kaj balo.

Mardo estis por mi plenplena tago. En la mateno mi gvidis la unuan session de la Scienca Kafejo – kvin 30-minutaj prelegoj pri plej diversaj temoj, kiel Robotoj (Balasz), Gemoj (Raola) kaj neŭro-

pedagogio (Tarranchini). Sekvis la IKU-prelegoj de Tonkin pri Marjourie Boulton kaj de Vera Barandovska-Frank pri la historia Akademio de Torino. Tiun ĉi prelegon Vera faris malgraŭ fortaj doloroj pro rompita mano. Tuj post la prelego ŝi estis urĝe portata al la hospitalo, kie ŝi ricevis gipsan memoraĵon el Torino. Inter tiuj du prelegoj okazis "Estraro respondas", dum kiu la estraranoj de UEA respondis demandojn de la publiko. Paralele okazis koncerto de JoMo. Fine de la tago mi gvidis la Fakan Forumon, dum kiu ĉ. 15 Fakaj Asocioj de UEA prezentis sin. Mi bedaŭris maltrafi la kortuŝan koncerton de Ĵomart kaj Nataŝa, kiu okazis samtempe kun la Faka Forumo. Vespere oni povis spekti la kabaredon "Mi diros al vi sekrete" de la duopo "Verda Banano" (Handzlik kaj Pilipoviĉ).



Parolas la Prezidanto de UEA

Bonŝance merkrede estis la ekskursa tago, kiu permesis al mi paŭzon en la kongresa premo. Ni elektis la ekskurson al Lago Maggiore, unu el la kvar grandaj belaj lagoj en norda Italio. La ekskurso inkludis boatadon al du palacoj sur insuloj en la lagoj, kun mirindaj ĝardenoj. Kompreneble estis multaj aliaj ekskursoj ĉiutage, sed pro miaj taskoj dum la Kongreso mi nur povis ekskursi dum unu duontago, por iom vidi la belan urbon Torino. Mi tre ŝatis la viziton en la plej karakteriza monumento, la 167,5 metrojn alta turo La Mole Antonelliana kun bela kupolo, kiu estis ankaŭ la kongresa emblemo. En ĝi estas instalita oketaĝa muzeo pri filmhistorio.

Jaŭde estis mia plej ŝarĝita tago kun pluraj prelegoj, kiujn mi devis prezenti aŭ ĉeesti samtempe. Matene okazis la dua sesio de la Scienca Kafejo kun pliaj kvin prelegoj, inter ili "La Memoro" (Butan), "La unuaj Esperanto-vortaroj" (Eckert), kaj "La danĝera lumo" (Fontaine). Sekvis kvar IKU-prelegoj pri variaj temoj: "Reguleco kaj nereguleco en la homa lingvo" (Goodall) kaj la daŭrigaj IKU-AIS prelegoj pri Kvantuma Teorio, la Kikonga Lingvaro kaj Lingva pej-

zaĝo. Paralele mi prelegis kadre de la kongresa temo pri "Migra-do al Israelo", prezentante la historion de la cionismo inter 1850-2000. Mi ankaŭ devis ĉeesti la publikan kunvenon de la Akademio de Esperanto, kiun mi sukcesis nur parte (verŝajne, ĉar mi ne sufiĉe bone kaptis la prelegon pri la kvantuma teorio, kiu permesas al partiklo esti samtempe en pluraj lokoj). :) Ne estante kvantuma partiklo, ankaŭ mi ne sukcesis liberiĝi por raporti pri Israelo en la MONA-kunveno. Bonŝance, almenaŭ oni aŭdis mencion pri la Israela Kongreso dum la inaŭguro. Posttagmeze okazis la tradicia futbala matĉo, en kiu la teamo de la esperantistoj venkis kun la rezulto 6:3 kontraŭ tiu de la peruaj enmigrintoj. Fruvespere okazis akcepto en la urbodomo, dum kiu la vicurbestro de Torino salutis nin, kaj ricevis E-librojn rilatajn al Torino kaj la kongreso. Poste estis vere impona koncerto de Kiara: "Blua Horizonto".



Ĉe budo de ELI en UKo

Vendrede matene ĝis la tagmezo okazis la dua kunsido de la Komitato de UEA, kaj paralele la Esperantologia Konferenco. Sekvis la du lastaj IKU-prelegoj, "Hidrogena Ekonomio" (So) kaj "La DNA de Esperanto" (Pennacchietti). Sekve (kaj parte paralele) mi gvidis la Sciencan Forumon, en kiu oni disdonis la atestojn al la sukcesintoj en la ekzamenoj de la IKU-AIS kursoj. Mia lasta tasko tiutage estis prezenti en la Aŭkcio du librojn: la IKU-libron kun la subskriboj de ĉiuj prelegantoj kaj la albumon de la Israela Kongreso, kiun Evgeno kontribuis por la Aŭkcio. Ambaŭ rikoltis sufiĉe altan enspezon por UEA. Dum la vespero okazis, kiel kutime, la Internacia Vespero.

Aldone al la prelegoj okazis multo ekster la salonoj, en la kongresejo. En la enirhalo estis pluraj budoj, aparte allogis tiu de la venonta kongreso en Tanzanio, kiu vendis multajn interesajn objektojn. Reprezentantino da la tanzania ambasado en Romo parto-

prenis la kongreson, kaj kun la venontjaraj organizantoj helpis reklami la kongreson en Aruŝo. En la libroservo eblis aĉeti librojn donace por Tanzanio, kaj okazis aŭtoraj duonhoroj de diversaj verkistoj, kiuj prezentis siajn novajn librojn. Kiel kutime, okazis ankaŭ Esperanto-kursoj kaj KER-ekzamenoj de ĉiuj niveloj.
Dum la kongreso aktivis pluraj asocioj: i.a. katolikoj okazigis en preĝejo ekumenan diservon, TEJO sinprezentis, la Internacia Koruso provkantis, okazis la Belartaj Konkursoj, Oratora Konkurso, kunvenoj pri UNo kaj UNESKO, prelegoj pri Italio, rapidkurso de la itala lingvo kaj ateliero pri origamio.
Oni prezentis la Librojn de la Jaro, okazis kvar komitataj forumoj, kunveno pri Greziljono. Grandan interesiĝon vekis la kunveno pri la venonta UK en Tanzanio. En la korto kongresanoj ludlernis, dancis kaj praktikis jogon. Okazis ĉiutage multaj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj al interesaj lokoj de la lando, kiuj logis for de la prelegoj multajn kongresanojn. La kongresa kuriero "La Taŭra Voĉo" informis pri ŝanĝoj en la programo kaj raportis pri la okazintaj programeroj.
Ĉe la Solena Fermo oni resumis la kongreson. Thomas Borman prezentis la rezolucion de la Kongresa Temo, la Ĝenerala Sekretario de UEA resumis la kongreson, kaj mi raportis pri la scienca programo. Fine salutis la Infana Kongreseto, kaj la italaj organizantoj transdonis la simbolan Esperanto-flagon al la reprezentantoj de la venonta UK en Tanzanio, unuafoje en Afriko.

## Rezolucio de la 108-a Universala Kongreso
### "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj"

La 1 318 partoprenantoj de la 108a Universala Kongreso de Esperanto, kunvenínte en Torino, Italio, inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2023, traktis la temon "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj". La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniaj lingvaj baroj

malhelpis interkomunikadon, kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.
Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.
Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

***Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:***

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.
2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatŝanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.
3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado, kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.
4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.
5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948.
6. Nun, en la jaro de la 75a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo, ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.
7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj, kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj, kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

Torino, Italio, 5a de aŭgusto 2023

**IOM MALFRUA, TAMEN, GRAVA KAJ PRINCIPE UTILA INFORMO**

# Gazetaraj Komunikoj de UEA

## MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA ESPERANTO-TAGO, 26 JULIO 2023

La mesaĝo estas sendita al UN. Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj gazetoj, Esperantaj kaj neesperantaj, estas petataj plusendi al koncerna(j) registara(j) oficejo(j) kaj al deputitoj. Ni ankaŭ instigas al lokaj grupoj marki la tagon per loka agado. Dankon!
Afiŝoj por informi pri la Esperanto-Tago 2023 estas haveblaj en la lingvoj: albana, angla, ĉina, dana, franca, germana, greka, hispana, hungara, irlanda, itala, japana, mongola, nederlanda, persa, pola, portugala, rumana, rusa, serba, slovena, svaĥila, sveda, ukraina, urdua.

En Varsovio je tiu ĉi dato en la jaro 1887, Ludoviko Zamenhof publikigis la unuan malgrandan libron kiu skizis lian novan internacian lingvon, Esperanton, kiu celis roli kiel relative facila dua lingvo por ĉiuj homoj tra la mondo.

La lingvo de d-ro Zamenhof estis baldaŭ alprenita de internaciistoj ne nur en Pollando kaj najbaraj landoj sed en Ĉinio kaj Japanio, Brazilo, kaj multaj aliaj landoj. El modesta komenco ĝi kreskis en internacian movadon, kiu helpis antaŭenigi pacon, kunvenigis profesiulojn en multaj fakoj, kaj evoluigis siajn proprajn literaturon kaj intelektajn interŝanĝojn.




Post kelkaj tagoj, la 108-a ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto malfermiĝos en Torino, Italio. Pasintjare, la kongreso okazis en Montrealo, Kanado; venontan jaron ĝi okazos en Aruŝo, Tanzanio.

Esperanto estas konata elemento ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj ĝiaj klopodoj por antaŭenigi kompreniĝon estas rekonitaj de UNESKO. Universala Esperanto-Asocio konsideras la agnoskon de homaj rajtoj kiel esencan fundamenton de sia laboro. Ĝi kunlaboras kun ĉiuj homoj kaj organizoj de bona volo, kiuj celas realigi pli pacan kaj daŭripovan mondon bazitan je internacia kompreniĝo kaj kunlaboro.

## La Deklaro de ELI pri la Milito en Gaza

En la spirito de la Zamenhofa revo pri monda paco, Esperanto-Ligo en Israelo kondamnas ĉiujn militojn kaj subtenas diplomatiajn solvojn de konfliktoj, inkluzive de la centjara konflikto inter judoj kaj araboj en la Mezoriento.

Tamen, ne eblas senhorore akcepti la teruraĵojn, kiuj okazis la 7-an de Oktobro: amasa masakro de ĉ. **1,200 israelaj civiluloj**, plejparte infanoj (eĉ beboj!), virinoj kaj maljunuloj, plenumita far la fundament-islamisma ekstremisma teror-organizo ***Ĥamas***, kun ne imageblaj kruelaĵoj (inkluzive senkapigon, perfortadon, torturadon kaj vivbruligon de la viktimoj). Neniam post la Holokaŭsto estis tiom da judoj murditaj dum unu tago, nur ĉar ili estis judoj kaj israelanoj (inter la viktimoj pluraj tamen estis ne-judoj kaj eĉ eksterlandanoj).

Estis kidnapitaj pli ol 240 personoj, kiuj daŭre restas en la manoj de ***Ĥamas*** en la Gaza-Strio, sen ajna informo aŭ vizito de la Ruĝa Kruco. Ili **ĉiuj** devas esti liberigitaj tuj kaj senkondiĉe. Por ke tiaj militkrimoj ne ripetiĝu, nepras ekstermi la regnon de ***Ĥamas***. Bedaŭrinde ankaŭ la palestinaj loĝantoj de la Gaza-Strio multe suferis, suferas kaj suferos pro la milito, kiun iniciatis iliaj ***Ĥamas***-regantoj – tamen ne eviteblas la disrompo de tiu ĉi **teror-organizo** por ebligi daŭripovan solvon de la konflikto kaj estontan rekonstruon de Gaza kaj de la ĉirkaŭa regiono en Israelo, profite por ambaŭ popoloj.

## MILITO INTER ISRAELO kaj ĤAMAS

**Amri WANDEL**

La redaktoro de la revuo de TEJO, "Kontakto" petis min verki artikolon pri la situacio en Israelo kaj Gaza post la Ĥamas-atako la 7-an de Oktobro 2023. Mi iom hezitis, konsciante ke mi ne kapablas ĉion priskribi objektive, sed mi konsentis, ĉar tiom teruraj atakoj kaj masakro de judoj neniam okazis post la Holokaŭsto. Same kiel la Holokaŭsto, ĝi estas nepre ne forgesenda kaj koninda de la tuta mondo, des pli, ke pliiĝas en la mondo atakoj kontraŭ judoj en kostumo de subteno de Palestino kaj kontraŭ-israelaj manifestacioj.



Precize kvindek jarojn post la traŭma suprizatako kontraŭ Israelo dum la plej sankta juda festo Jom Kipur en Oktobro 1973, okazis denove surprizatako meze de juda festo kiu same trafis la israelan armeon tute ne preparitan. La diferenco tamen estas granda: en 1973 estis batalo inter armeoj - la armeoj de Egiptio, Sirio kaj Jordanio atakis la israelan armeon.

Kontraŭe, en 2023 okazis amasa masakro de israelaj civitanoj, plejparte infanoj, virinoj kaj maljunuloj, farita de la fundament-islama ekstremista teror-organizo Ĥamas, kun nekredeblaj kruelaĵoj similaj al tiuj faritaj de Islama Ŝtato (ISIS).
Ŝirmitaj de ĉ. 3 000 raketoj lanĉitaj dum kelkaj horoj, ĉirkaŭ 3 000 teroristoj trairis la limon kaj dum 4 horoj sisteme murdis ĉirkaŭ 1 400 israelanojn, plejparte familiojn, virinojn, infanojn kaj bebojn, kidnapis pli ol 240, el ili pli ol 30 infanoj, kiuj daŭre restas kaptitaj ĉe Ĥamas en Gaza, sen iu ajn plia informo aŭ kontakto kun la Ruĝa Kruco. La teroristojn sekvis amaso da neorganizitaj palestinanoj el Gaza, kiuj plu rabis, perfortis kaj forbruligis, kune detruante pli ol dudek vilaĝojn kaj urbetojn proksimajn al la limo. La kunordigita amasatako en dekoj da lokoj, samkiel la kvanto de municio kaj armiloj kaj eĉ skribaj instrukcioj, kiujn portis la atakantoj, malkaŝas longe kaj detale preparitan planon kun unuнura celo: murdi kaj kaperi kiel eble plej multajn israelanojn. Dum la unuaj tagoj post la teruraĵo mi ricevis dekojn da subtenaj kaj zorgantaj mesaĝoj de esperantistoj el la tuta mondo. Jen mia respondo al unu el ili, kiu reprezentas ankaŭ la aliajn: La tuta esperantistaro estas ege konsternita nuntempe vidi, kio okazas al niaj israelaj gesamideanoj. Israelaj esperantistoj bonŝance ne estis rekte afliktitaj, sed la tuta lando estas nun en malfacila situacio, lernejoj ne funkcias, multaj estas mobilizitaj al la rezerv armeo, kaj oni atendas pli bonajn, pli trankvilajn tagojn. Militoj ne estas veraj solvoj por vivi en paco kaj harmonio...
Ĉiuj esperantistoj, en Israelo kaj tutmonde, dividas tiun idealon. Ni tamen konscias, ke antaŭ la prirevata paco devas okazi milito, kiu por ĉiam forigos la minacon de la terorista regno de Ĥamas, kies deklarita celo estas detrui la judan ŝtaton kaj murdi kiel eble pli da israelaj civitanoj. Dum 16 jaroj ĝi atakas israelajn urbojn kaj vilaĝojn per raketoj. Tamen, pro humanaj kialoj, Israelo provizadis al Gaza elektron, akvon, laboron en Israelo, kaj ebligis internacian financan subtenon. Nun denove evidentiĝas, ke tiun subtenon Ĥamas uzadis ne por helpi al la enloĝantoj en Gaza, sed por konstrui pli da raketoj kaj trejni pli da murdistaj teroristoj por mortigi kiel eble pli da israelanoj. La kruela amasmurdado de la 7-a de Oktobro 2023 - la plej granda nombro de judoj estis murditaj en unu tago post la Holokaŭsto. Bedaŭrinde ankaŭ la palestina enloĝantaro de Gaza suferas kaj suferos multe pro la milito, kiun iniciatis iliaj Ĥamas-regantoj. La militan damaĝon al civiluloj en Gaza intensigas la sistema taktiko de Ĥamas, konstrui siajn tunelojn, kazernojn kaj raketo-lanĉejojn en dense enloĝataj areoj, kaj aparte sub hospitaloj. Pri la filozofio de Ĥamas oni povas lerni de intervjuo kun Ĥamas-oficialulo Musa Abu Marzouk en la televida kanalo MEMRI: https://www.memri.org/tv/hamas-official-mousa-abu-marzouk-tunnels-gaza-protect-fighters-%20not-civilians. La intervjuanto demandis al li : “Kiam vi konstruis 500 km

da tuneloj en Gaza, kial vi ne konstruis ŝirmejojn por civiluloj?" Abu Marzouk: "La tuneloj estas por ni. La civitanoj en Gaza estas sub la respondeco de UN kaj Israelo". - "La tuneloj estas por protekti nin kontraŭ la aviadilaj atakoj [de Israelo]. Ni batalas el la tuneloj. 75% de la loĝantoj de la Gaza Sektoro estas rifuĝintoj, prizorgataj de Unuiĝintaj Nacioj (UNRWA). Estas la respondeco de la okupacio provizi servojn al la loĝantoj de Gaza". Leviĝas kelkaj demandoj pri la historia fono:

1. Kontraŭ kiu Ĥamas batalas kaj per kiuj rimedoj? (respondo: kontraŭ Israelo, per teroro, celante mortigi kiel eble plej multe da israelanoj)
2. "75% estas rifuĝintoj" - ekde kiam? (Ekde 1948 la arabaj landoj kaj sekve la palestinanoj transformis la rifuĝintojn en politikan armilon kontraŭ Israelo, kaj anstataŭ rehabiliti ilin, ili zorgis konservi ilin en ĉi tiu situacio, kiu ne havas ekvivalenton en la mondo laŭ daŭro kaj la amplekso de helpo).
3. Kia okupacio*? (Ekde 2005, ne ekzistas eĉ unu israela soldato en la Gaza Sektoro, kaj la florantaj setlejoj kiuj estiĝis en Guŝ Katif (dezerta regiono en la sudo de la Gaza Sektoro) kaj en la nordo de la Gaza Sektoro estis dolore delokigitaj fare de Israelo, postlasante la forcejojn kaj infrastrukturon, kiuj estis poste uzitaj de Ĥamas por konstrui kazernojn kaj misilŝaftojn por bombadi la loĝantojn de Israelo). Iom pli da historia perspektivo:

Israelanoj kaj palestinanoj interparolis pri diplomatia solvo de la konflikto en la pasinteco (ekz. en Oslo en la naŭdekaj jaroj), kaj certe devos tion fari estonte. Tamen, komprenu, ke la Ĥamas-masakro de la 7-a de oktobro estas por judoj kaj israelanoj same traŭma kiel la Holokaŭsto: en ambaŭ katastrofoj senhelpaj judoj estis amase mortigitaj kruele, sisteme kaj sendiference inter viroj, virinoj, infanoj kaj beboj, nur ĉar ili estis judoj (ĉi-foje israelanoj**). Krome, la nuntempan masakron akompanis ne-homa torturado, bruligado, perfortado kaj senkapigoj. Tiaj hororaĵoj estis detale fotitaj kaj dokumentitaj, foje eĉ de la murdistoj mem. En intervjuo kun "Sky News" la 16-an de oktobro, Yosi Landau, kiu volontulas por ZAKA (organizaĵo kies tasko estas indentigi mortintojn en akcidentoj, bataloj kaj

*Mallonga historio de la Gaza Sektoro en la lastaj 75 jaroj: 1948-1967 - egipta okupado, 1967-2005 - israela okupado, 2005-2007 - sub la kontrolo de la Palestina Aŭtoritato, 2007-2023 - Ĥamas-okupado.

** La teroristoj buĉis ne nur judojn sen elekto, sed ankaŭ filipinanojn, tajlandanojn, kiuj videble ne estis judoj, kolektis ilin en hangaro kaj mortpafis la grupon. Estis mortpafitaj palestinaj laboristoj, kiuj petegis por siaj vivoj en la araba lingvo - vane. (Ni eksciis multe el la korp-kameraoj de la mortigitaj teroristoj).




teror-atakoj) dum 33 jaroj, diris ke ĉirkaŭ 80% de la 280 murditoj kiujn li kaj lia teamo pritraktis en la du plej terure trafitaj kibucoj, Kfar Aza kaj Be'eri, montris signojn de torturado - inkluzive de la kadavroj de infanoj. La israela prezidento Yitzhak Herzog, en intervjuo kun CNN la 15-an de oktobro, malkaŝis tion, kion li priskribis kiel Ĥamas "gvidlibron", kiu estis trovita ĉe mortigita teroristo. "Temas pri libreto, [kiu klarigas] kiel eniri civilajn loĝlokojn - kibucon, urbon, moŝavon* - kiel ataki ilin, kaj antaŭ ĉio, kion fari kun la civitanoj. La libreto priskribas detale, kiel torturi la civitanojn kajkiel forrabi aŭ mortigi lin", diris Herzog. Israelo, kaj espereble ĉiu homo kiu konas tiujn faktojn, ne povas akcepti komparon de tiuj hororaĵoj al la agado de la israela armeo en Gaza, kiu celas forigi la Ĥamas-minacon por ĉiam. La granda nombro de civiluloj trafitaj venas de la fakto, ke Hamas sisteme uzas la palestinanojn de Gaza kiel homa ŝirmilo, intence konstruante siajn instalaĵojn kaj raketolanĉilojn meze de dense enloĝataj regionoj, en civilaj loĝturoj, kaj apud (foje en, aŭ sub) hospitaloj, lernejoj kaj moskeoj. La tragedio de Gaza estas, ke ekde la komenco de la regado de Ĥamas en la Sektoro ĉiujn kelkajn jarojn okazas militaj rondoj pro kaj post atencoj kaj raketopafadoj kontraŭ Israelo. Ne estas certe, ke forigo de Ĥamas solvos la konflikton kun la palestinanoj, sed momente tio ŝajnas la sola ebleco, kiun Israelo havas, ĉar la alian vojon, kunvivadon kun Ĥamas kiel la suvereno, ĝi provis dum 16 jaroj sensukcese. Eble ĝuste la nuna katastrofo ambaŭflanka estos la ĝermo, el kiu kreskos paco aŭ solvo, samkiel la unua packontrakto inter Israelo kaj araba lando, Egiptio, sekvis la militon de 1973: ambaŭ flankoj komprenis, ke ili neniam provos venki milite. Oni esperas ke alia gvidantaro, pli realisma kaj malpli "Ŝahidema" ("martiro", preta morti kaj kuntiri sian popolon en la abismon por sankta batalo kontraŭ Israelo), sucesos kunlabori kun la internaciaj instancoj kaj kun Israelo por ekonomie rekonstrui la Gazan Sektoron, same kiel okazas jam de tridek jaroj en Cisjordanio, kiun regas la pli modera Palestina Aŭtoritato (perforte forpelita de Gaza far' la Hamas en 2007). Ni esperu, ke post la forigo de tiu murdista regno eblos rekonstrui la du landojn, Gaza-distrikton kaj la israelan regionon apud ĝi por prospera kunekzistado.

* moŝavo – eŭrop-tipa vilaĝo, distinge de kibuco aŭ alia kolektiva formo.

**Atenton!** Por nepagintoj de la ELI-kotizo pli ol tri jarojn, **ĉi tiu numero estas la lasta!**

## KONGRESA ITALIO

**Nina DANILJUK**



La 5.08–12.08. 2023 mi kun mia universitata kolegino sukcesis paropreni en la kunkongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) – la 56a Kongreso de ILEI kaj TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) – la 79a Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis en la ĉemara urbeto Lignano Sabbiadoro apud Venecio. Entute venis aŭ aliĝis rete pli ol 400 kongresanoj el 5 kontinentoj (proksimume 170 instruistoj / instruantoj kaj pli ol 250 gejunuloj).
Estis abunda programo sub 2 temoj: “Instrui Esperanton en Lernejoj” kaj “Intergeneracia Kunlaboro pri Edukado”. Okazis prelegoj pri lerneja instruado de Esperanto en diversaj landoj, pri la itala lerneja projekto “La 30 oraj horoj”, pri virina agado, pri interkultura komunikado, Asembleo de Itala E-instituto, trejnseminario “Interkultura Kompetento”, Lingva Festivalo, kursoj por komencantoj kaj progresantoj k.t.p.
Mi prelegis pri instruado de Esperanto en Ukrainio en la historia aspekto, Svitlana Kozarenko proponis 4 prelegojn pri Ukrainio (kutimoj, tradicioj, historio, lingva situacio, literaturo kaj kulturo). Enkadre de la Lingva Festivalo mi prezentis la ukrainan lingvon.
Dum la komitata kunsido ni parolis pri la situacio en diversaj landaj sekcioj, pri sekva ILEI-kongreso. Kiel vi scias, printempe mi proponis okazigi ILEI-kongreson 2024 en Ukrainio. Sed la propono ne estis akceptita, ĉar la kongreso ne povas okazi en la lando, kie daŭras milito. Do, ni devas atingi la Venkon kaj Pacon. Ankoraŭ ne estas decidite kie ĝin akceptos la partoprenantoj en la sekva jaro: en Afriko (UK- 2024 okazos en Tanzanio) aŭ en Litovio (tie estas planita IJK-2024).
En la kongreso okazis ekskursoj, koncertoj de JoMo, de Ĵomart kaj Nataŝa, de junaj muzikistoj. Estis grave, ke ĉiuj E-artistoj estas kontraŭ milito en Ukrainio. Do, JoMo komencis kaj finis sian koncerton per ukrainaj kantoj, la menciita dueto dediĉis al la problemo du kant-

ojn “Al Ukrainio” kaj “Milito”. Multaj partoprenantoj demandis pri la situacio en nia lando, subtenis nian batalon. Mi ricevis mondonacojn por nia armeo de koreaj esperantistoj kaj de unu rusino, kiujn mi transdonis al la teritoria brigado de Volinio, kie militservas mia frato. Do, mi taksas la 56an Kongreson de ILEI kiel tre sukcesa. Danke al la organizantoj kaj miaj familianoj mi havis belegan, trankvilan kaj ĝojoplenan semajnon en Italio.

## “OREST KUZMA - TAGOJ” en Kolomeo.

**Petro POLIVODA**



Apud la muzeo de O.Kuzma

Jam tradicie fine de aŭgusto en la urbo Kolomeo de Ivano-Frankivska provinco en la okcidento de Ukrainio okazas E-renkontiĝo “Orest Kuzma - Tagoj”, en kiuj partoprenas esperantistoj el la tuta Ukrainio kaj ankaŭ eksterlandaj gastoj por omaĝi la memoron de la elstara kolomeano, kiu estis konata pedagogo, publika homo, verkisto kaj esperantisto, redaktoro de Ukraina Stelo”, la unua Esperanta revuo en Ukrainio.
Malgraŭ la nuna milito, la vivo daŭras, kvankam, kompreneble, ne ĉiuj dezirintoj povis veni. Ĉi-jare la renkontiĝo de la esperantistoj okazis kun la ĉeesto de la vasta publiko kaj intelektularo de Kolomeo enkadre de la festado de la “Tago de Kolomeo” la 18-an de aŭgusto 2023 en la Nacia Muzeo de Popola Arto de Huculujo* kaj Pokuttja**, en la memor-ĉambro de Andrij Ĉajkovskij, fama ukraina verkisto, kiu dum longa tempo loĝis en Kolomeo kaj estis ankaŭ esperantisto.
Speciale por “Orest Kuzma – Tagoj” kaj okaze de la 110-a datreveno de la fondo de la Esperanto-revuo “Ukraina Stelo” la Ivano-Frankivs-

* Huculujo - etnokultura regiono de Ukrainio, lando de la ukrainaj montanoj — huculoj, situanta en la okcidento de Ukrainio.

** Pokuttja - historia kaj geografia regiono de Ukrainio, la sudorienta parto de la nuntempa Ivano-Frankivska provinco.

ka eldonejo “Lileja - NV” aperigis la libron de la konata historiisto kaj publika persono Bohdan Volosînskij “Kaj leviĝis super Pruto* ukraina stelo de Esperanto”. La libro informas pri la historio de la kreado de la unua ukraina esperanta periodaĵo “Ukraina Stelo” eldonita en Kolomeo en jaroj 1913-1914 kaj 1922-1923. Ĝi montras la historian fonon de la fondo kaj eldonado de la revuo fare de Orest Kuzma, la gvidanto de la kolomeaj esperantistoj. La libro inkluzivas mallongajn biografiajn referencojn de la plej aktivaj verkintoj de la tekstoj en la revuo.
Por aprezi la personajn meritojn de Oleksandr (Lesj) Denisjuk kaj Andrij Ĉajkovskij en la promocio de la ukraina Esperanto-movado, la libro enhavas tekstojn de iliaj publicistikaj artikoloj, same kiel la tekston en Esperanto de humura rakonto de A. Ĉajkovskij, kiun li verkis en la ukraina kaj mem esperantigis, kaj kiu estis publikigita sur la paĝoj de “Ukraina Stelo” en jaro 1922. Poste la manskribita ukrainlingva originalo estis perdita, kaj nun ĝian tradukon el Esperanto al la ukraina faris ukraina kaj Esperanta poeto kaj tradukisto P.Palivoda. La libro estis publikigita danke al lokaj mecenatoj Vasil kaj Oksana Antonjuk.
Dum la prezentado de la libro en la muzeo, la teksto de Andrij Ĉajkovskij rehavigita al ukrainaj legantoj estis talente surscenigita fare de junaj aktoroj de la Kolomea Popola Drama Teatro.
La dua parto de “Orest Kuzma – Tagoj” okazis en la Kolomea Esperanto-Muzeo de Orest Kuzma, kies fondinto kaj posedanto estas kolomeano Vasil Antonjuk.

---

* Pruto - rivero en Okcidenta Ukrainio

> Estimataj legantoj! En la antaŭa numero en la artikolo de s-ro Tomasz Kamusella (pĝ 23-24) anstataŭ la vorto “rasismo” necesas legi “raŝismo” - nun estas sufiĉe vaste uzata termino en Eŭropo, kiu signifas “rusian faŝismon”, kiu estas demonstrata far la rusiaj soldatoj sur la okupitaj teritorioj de Ukrainio. Mi pardonpetas pro la miso.
>
> La redaktoro

**PARABOLO**

Ĉe la vojo staris azeno, alligita al arbo. Preteriranta Diablo malligis la azenon. La azeno, eksentinte la liberon, iris al proksima bedaro kaj komencis manĝi tie ĉion, kion vidis ĝiaj okuloj.



Edzino de la najbaro, en kies bedaro "mastrumis" la azeno, prenis fusilon kaj mortpafis la azenon.

Mastro de la azeno ekaŭdinte la pafon, eliris el la domo, ekvidis mortintan azenon, kaj mortpafis la virinon. La najbaro, kompreninte kio okazis, mortigis la viron. Infanoj de la viro venĝe bruligis domon de la najbaro, kaj la najbaro mortigis ankaŭ ilin...

Oni demandis Diablon: ĉu vi vidas, kion vi faris?

La Diablo respondis: mi faris nenion fian, mi nur malligis la azenon.

**La moralo:** Se vi volas ke ĉirkaŭ vi regu paca bonordo, ne donu liberon al azenoj!

## Tri someraj kunvenoj en Israelo

(La artikolo aperis en la Revuo Esperanto, Oktobro 2023)

**Amri Wandel**

1. Kvankam fizike ĉeestis nur tri s-anoj, la somera Landa Kunveno de ELI, okazinta en julio estis unu el la plej sukcesaj en la lastaj jaroj. Tiu ŝajna kontraŭdiro kompreneblas, ĉar temis pri la unua hibrida Landa Kunveno de ELI, kun granda internacia partopreno. Ĝi okazis per Zoom, kiel la Tel-Aviva klubo jam delonge faras regule por siaj semajnaj kunvenoj. Partoprenis entute pli ol dudek s-anoj, ĉ. duono eksterlandanoj, kaj ankaŭ pluraj israelaj s-anoj partoprenis virtuale. Komence Luiza Carol prezentis rakonton el sia nova libro https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3355; sekve Inbar Mor kantis en Eesperanto, kaj Cristoph Frank montris novajn fotojn de la Israela Kongreso kaj Postkongreso.

Laste Amri prezentis fotojn kaj impresojn el la 100-a Germana E-Kongreso. La tuto estis registrita kaj estas spektebla en https://www.youtube.com/watch?v=rAi4gVUlBrE .

2. Post tiu magra fizika ĉeesto, estis bela surprizo renkonti dudekon da

partoprenantoj en la tradicia Somerfina Renkontiĝo de ELI okazinta fine de aŭgusto en la jam kutima restoracio en Tel-Avivo. En la kunveno, organizita de Jehoŝua Tilleman, partoprenis ankaŭ pluraj junaj personoj, inter ili novuloj, kiuj lernis Esperanton per Duolingo. Du samideanoj eĉ kunprenis la nepojn, kiuj esperèble ŝatis la kunvenon kaj benos la geavojn. Por la plimulto de la partoprenantoj tiu estis la unua ĉeesta kunveno post  la Israela Kongreso en aprilo, ĉar nur malmultaj fizike partoprenis la Landan Kunvenon en julio. Krom viglaj konversacioj kaj bongustaj picoj, okazis ankaŭ kultura programo: Amri rakontis spertojn de la UK en Torino, prezentante diversajn librojn kaj aliajn dokumentojn de la Kongreso. Estis disdonita la nova duobla n-ro de Israela E-isto (56-paĝa kun pluraj artikoloj pri la Israela Kongreso, http://esperanto.org.il/dosieroj/IE174-175.pdf). Estis prezentita la nova libro de Luiza, la albumo de la Israela (Post) Kongreso, donacita al Ŝulamit, kaj aliaj libroj el la kongresa sako kaj rikolto de la UK.

3. Komence de septembro okazis hibrida kunveno pri la UK en Torino, fizike en la klubejo en Alon-turo kaj virtuale en la kutima zoomadre-so. Amri prezentis fotojn de la UK, kaj oni povis vidi artikolojn pri la UK en la septembra revuo Esperanto. En la posta estrarkunsido de ELI estis traktitaj i.a. la venonta Israela Kongreso (okazonta en la unua duono de aprilo 2024), redakta komisiono por "Israela Eperantisto" kaj la Zamenhofa Vespero (18.12).



En la restoracio

## INTERESE...

Komunikado kun hundoj influas imunecon de homoj.

Sciencistoj de Universitato de Virginia (Usono), esploris, ke karesado de hundoj helpas plifortiĝon de la homa imuneco. La ekspertoj analizis datumojn de pli fruaj esploroj, kaj venis al la konkludo, ke komunikado kun hundoj bonefikas al la stato de homa organismo.
Jen, nivelo de stres-hormono "kortizolo" malaltiĝas ĉe homoj post nur 10-20 minuta pasigo de tempo kun hundo.



Krome, la aŭtoroj fiksis altiĝon de nivelo de hormono "oksitocino", kiu influas la bonan sanstaton. Tio influas la imunecon kaj la bonstaton de la nerva sistemo. Estas interese, ke la samo rilatas ankaŭ al la hundoj. Komunikado kun hundo estas ligita ankaŭ al pozitivaj rezultoj por la sano, inkluzive sanon de la koro kaj pliaktiviĝon de la fizika aktiveco. Do, ĉeesto de la hejma besto estas ligita al pli bona psika stato – la besto havigas la komunikadon, fonton de kontinueco en la vivo, kaj igas la mastrojn senti sin amataj.

_NDLR_. *Peto al la legantoj: se en via familio membras hundo, bonvolu priskribi kaj sendi vian opinion pri la hundo-terapio el via propra sperto... Antaŭdankon!*

## VIZITO AL KURACISTO

Mi iom frostumis. La temperaturo proksimas al 39 gradoj laŭ Celsio, tamen la humoro, strange, estas bonega. La kuracisto demandas iujn bagatelojn, kaj kvazaŭ interalie, demandas min:



- Kiujn kuracilojn vi uzis?
- Kaliketon da Beĥer-likvoro kaj pokalon da varmeta biero...

La kuracisto ĉesis skribi, konsterniĝis por momento...

- Kolego, kial do vi tuj ne diris, ke ankaŭ vi estas kuracisto?

**TRATEMPA GASTO – VOLEMIO NOBLA**

(botanika sensacio) **Tetiana KOLOMIJEC**



Botanika ĝardeno nome de akademiano O.Fo-min ĉe Kijiva Nacia Universitato nome de T.Ŝev-ĉenko sekvajare celebros sian 185-jariĝon. Dum sia ekzisto, la ĝardeno fariĝis vera muzeo de vivantaj kreskaĵoj, kies kolekto konsistas el ĉirkaŭ 10 miloj da specoj, kultivoformoj kaj hibridoj. Signifa parto de la botanika kolekto konsistas el kreskaĵoj el tropikoj kaj subtropikoj, kiuj estas prezentitaj en ekspozicioj, dediĉitaj al certaj botanik-geografiaj zonoj de la Tero. Kompletigo de la kolektoj efektiviĝas precipe per interŝanĝo de semoj kun botanikaj ĝardenoj de la mondo.

Tamen, dum pli ol 30 jaroj veno de la semoj el botanikaj ĝardenoj de Aŭstralio al nia ĝardeno estis ĉesita. Tio estis ligita al la ŝtata strategio gardi aŭstralian biodiversecon. Antaŭ invado de Rusio en Ukrainion februare de la jaro 2022, nian botanikan ĝardenon vizitis Ekstraordinara kaj Plenrajta Ambasadoro de Aŭstralio en Ukrainio s-ro Bruce Edwards. Li interesiĝis pri kolektoj da kreskaĵoj en la ŝirmita grundo.

Dum longa tempo, volemio, tiu arbeca konifera kreskaĵo, estis konata nur danke al la elfositaj restaĵoj.

Oni konsideris, ke ĝi formortis antaŭ preskaŭ 200 milionoj da jaroj. Volemion oni trovis tute hazarde en la jaro 1994 en Aŭstralia Nacia Parko “Wollemi”. Rimarkis la nekonatan kreskaĵon kun folioj, similaj al vosto de stegosaŭro, kaj kun ŝelo, simila al “bolanta ĉokolado”, laboristo de la parko, David Noble. Ĉi tiu okazaĵo fariĝis vera botanika sensacio de la XX-a jarcento.

Sinjoro Ambasadoro estis agrable mirigita pri tio, ke por flaŭro de Aŭstralio estis dediĉita granda ekspozicio da unikaj kreskaĵoj. Li proponis okaze de la 30-jariĝo ekde reestablo de diplomataj interrilatoj inter niaj landoj, donaci novan eksponaĵon, kaj petis liston de la deziritaj kreskaĵoj. Memkompreneble, en la unua loko estis unu el la

plej antikvaj kreskaĵoj sur Tero – volemio nobla (Wollemia nobilis). La fizika kvanto da "Wollemia nobilis" en tempo de ĝia trovo estis malpli ol 100 ekzempleroj. Tian trovaĵon eblas kompari, verŝajne, kun trovo de vivanta dinosaŭro, ĉar la trovitaj kreskaĵoj ekzistis ankoraŭ en ĵurasa periodo.



Bruce Edwards, Tetiana Kolomijec, kaj... la volemio.

Registaro de Aŭstralio akceptis decidon kaŝi informon pri la natura populacio de volemio en plena sekreto, por preventi penetron de potenciaj infektoj por la kreskaĵoj, kaj ankaŭ gardi ilin kontraŭ brutalaj agoj de kolektantoj kaj vandaloj. Nur kelkaj sciencistoj havis permeson viziti la protektatan lokon. Antaŭ la veno, la esploristoj estis devigitaj ŝanĝi la vestaĵojn kaj eĉ lavi la piedojn por eventuale ne infekti la kreskaĵojn. Tiu, kiu sen la permeso provos rigardi volemion en la la natura medio, estos devigita pagi monpunon je $ 33000. Ĉi tiu politiko validas ankaŭ nun. Kompletigi la kolekton per tiu rara kreskaĵo estis nia revo, al efektivigo de kiu, post 24 de februaro 2022 neniu eĉ esperis. Ekde komenco de la milito ĉiuj penoj de laborantoj de la botanika ĝardeno estis direktitaj al konservado de jam ekzistantaj kreskaĵ-kolektoj, kiuj havas statuson de la "nacia valoro".

Kiam oni telefonis el la aŭstralia ambasadejo, kaj informis nin, ke brita humaneca misio, kiu liveras medikamentojn kaj medicinan aparataron por ukrainiaj hospitaloj, konsentis liveri en nian ĝadenon volemion, nia ĝojo estis senlima. Junie, unue per aviadilo de Aŭstralio al Granda Britio, kaj poste per kamiono en Kijivon, kune kun humaneca misio, la volemio trafis en nian ĝardenon.

Nun, post reenplantigo en pli grandan ujon, ĝi situas en nia granda subtropika oranĝerio de la botanika ĝardeno, en ekspozicio, dediĉita al aŭstralia flaŭro. Aŭguste la ambasadoro de Aŭstralio, Bruce Edwads, vizitis nin kaj konvinkiĝis, ke volemio faris sukcesan vojaĝon en

Ukrainion. Li konstatis, ke la nova hejmo plaĉas al la aŭstralia kreskaĵo - ĝi bone adaptiĝis, kaj sur kelkaj branĉoj aperis "viraj" strobiletoj, kio montras transiron de la arbeto al matura fazo de la vivo.
Vere elfoseca kreskaĵa relikvo atendas ĉiujn dezirantojn efektivigi tempan vojaĝon dum vizito al botanika ĝardeno nome de akademiano O.Fomin en Kijivo. Bonvenon!

**INTERESAJ FAKTOJ PRI LA MORTA MARO**

La "Morta Maro" estas natura mirindaĵo, foje oni nomas ĝin "Sala" maro. Ĝi vokas grandan interesiĝon de multegaj homoj tra la mondo. Konatiĝu kun kelkaj faktoj:



- Ĝi nomiĝas Morta Maro, sed vere ĝi ne estas maro. Ĝis estas lago kun saleca akvo.
- Ĝi estas la plej profunda lago kun saleca akvo, el ĉiuj ekzistintaj lagoj sur la planedo. La maksimuma profundeco estas 306 metroj.
- Se ni mezuros profundecon de la lago konforme al la marnivelo, ĝi estos eĉ pli profunda. Ĝiaj akvosurfaco kaj bordnivelo estas 427 metroj pli sube ol la marnivelo, tial ĝi estas la plej malalta akvejo sur la Tero.

Ĉi tiu supersaleca lago estas unu el la plej salecaj lagoj en la mondo. Koncentriĝo de la salo en la akvo estas 33,7%. Sed tio ne faras ĝin la plej saleca akvejo, ĉar en laguno Garabogazköl de Kaspia Maro (fakte ankaŭ ĝi estas lago) kaj lago Vanda en Antarktido havas 35% da saleco, lago Assal' en centr-okcidenta parto de Dĵibuti havas 34,8% da saleco, kaj stavo Don Juan, kiu situas en la sekaj valoj McMerdo en Antarktido, havas eĉ 44%! Ĉar la Morta Maro estas lago, ĝi havas

konkretan longecon 50 kilometrojn kaj larĝecon - 15 kilometrojn. Pro la ekstrema saleco neniu formo de la vivo povas esti en tiu akvo. Ĝuste pro tio la saleca lago estas konata kiel Morta Maro. Tamen tio ne estas 100%-a vero. En la pluvperiodoj la saleco iom reduktiĝas, kaj tio donas eblon por iuj bakterioj aperi en ĝi.
Neniuj aliaj formoj de la vivo en la akvo estas trovita. La Morta Maro havas tre neordinaran econ. Ĝi preskaŭ konstante "elkraĉas" asfalton. La asfalton oni importis de la Morta Maro en Antikvan Egiption por la mumiigo. Pro tiu fenomeno grekoj nomis la Mortan Maron "Lago de Asfaltitoj".
La akvo neniel elfluas el la Morta Maro, ĉar de tri flankoj ĝi estas ĉirkaŭita de seka tero. La sola apertita flanko estas vojo, tra kiu la akvo enfluas el riveroj kaj rojoj.



Diference de nia ordinara salo, la salo de la Morta Maro estas tre amara. Ĉi tiu amara salo helpas al kuracado de diversaj haŭtmalsanoj, ekz. psoriazo, celulito, aknoj, urtikario ktp. Ĝi helpas malpliigi ankaŭ streĉon, mildigas haŭterojn, muskolajn dolorojn pro ostoartrito. Ĉi lago estas ĉefa fonto de kalio, kiu estas uzata en la tuta mondo por agrikulturaj laboroj. Ĉirkaŭ 50% de la loka ekonomio apogas sin sur agrikultura produktado el teritorioj ĉirkaŭ la Morta Maro.
Dum la tuta jaro la klimato ĉe la Morta Maro restas seka kaj sunriĉa. Jara kvanto da atmosferaj precipitaĵoj estas malpli ol 50 mm. La Morta Maro estas antikva lago, kies aĝon oni kalkulas proksimume je 2 – 3,7 milionojn da jaroj.






## LA PIEDSPUROJ

... Iun nokton la homo sonĝis. Li sonĝis, ke li mortas.
La morto ekis ĝuste tiel, kiel tio estis priskribita en libroj, legitaj kiam li estis viva: malrapida deteriĝo, adiaŭa, de birda flugo rigardo al sia korpo, kiun li kompatis ne pli ol haron, falintan de sur la kapo... Poste flugo tra longa malhela koridoro, malrapida turno kaj... blindiga lumo, pro kiu fariĝis bone kaj kviete.
Post momento li ekvidis sin iranta riverbordon kune kun Dio. En la foro altis Pordego al la Paradizo.
Sed antaŭ ol trairi ĝin, la homo volis ankoraŭfoje, lastfoje rigardi la riveron de sia vivo.
Li volis rememori ĉiujn spurojn, lasitajn de li sur la sablo.
Retrorigardante li vidis bildojn de sia vivo. Ili ekflamadis unu post la alia en ĉielo, ĝuste super la rivero.
Kaj malsupre, surborde, laŭlonge de la rivero, li klare vidis du parojn da piedspuroj. Unu el ili apartenis al Dio. La dua - al li.
Sed kun granda miro li rimarkis, ke kun la plej pezaj kaj malĝojaj periodoj de la vivo koincidas nur unu paro da spuroj.
Animon de la homo plenigis la tristo. Li turnis sin al Dio:
- Sinjoro mia, Vi ja promesis, ke se mi decidos sekvi Vin, Vi estos kun mi ĉiam, kaj ne lasos min eĉ por momento! Sed mi vidas, ke dum la

plej amaraj kaj malfacilaj tagoj de mia vivo Vi ne estis kun mi. Kie Vi estis, Sinjoro? Kial Vi lasis min, kiam mi pleje bezonis Vin?
Respondante Dio brakumis la homon, kaj kun rideto diris:
- Ido mia, sciu, ke mi amas vin ĉiam, kaj lasos vin neniam. Tie, sur la riverbordo, kie videblas nur unu paro da spuroj, kiam viaj tagoj estis plenaj de malespero, mi portis vin surbrake...

*<u>NDLR</u> La teksto estas prenita el la **mendebla ĉe la redaktoro** broŝuro "Homa saĝo", rekomendita de Renato Corsetti, kiel legaĵo por studantoj de la dua nivelo.*

## SAĜECO DE BUDHO

Iris foje Budho kun siaj multnombraj disĉiploj tra iu vilaĝo. Kolektiĝis iom da homoj - la kontraŭuloj - kaj ili tuj komencis arde kaj kolereme ofendi Budhon. Li silente kaj trankvile aŭskultis ilin. Kaj pro tiuj silento kaj trankvilo ili eksentis sin malkomforte. Aperis nekompenebla por ili situacio: ili ofendas homon, kaj tiu aŭskultas iliajn vortojn kiel muzikon. Unu el la ofendantoj turnis sin al Budho:
- Kio okazas? Ĉu vi ne komprenas, kion ni diras?
- Ĝuste pro la kompreno estas tiu profunda silento, - respondis Budho. - Se vi venus al mi antaŭ dek jaroj, mi atake rebatus vin. Tiam mi ne havis la komprenon. Sed nun - mi komprenas. Kaj pro via stulteco mi mem ne povas puni min. Estas via afero - ĉu ofendi min aŭ ne, sed ĉu akcepti viajn ofendojn aŭ ne - ĝuste en tio estas mia libero. Vi ne povas trudi tion al mi. Mi simple ne perceptas viajn ofendojn - por mi ili valoras ja neniom. Vi povas repreni ilin... Kaj nun miaj disĉiploj vin tuj draŝos...

## VIRA PROBLEMO

En tre-tre-tre malnova tempo Dio modlis dek Adamojn.
Sed baldaŭ por ili fariĝis enue en la Paradizo, kaj ili diris tion al la Patro. Dio donis al ili paston kaj diris:
- Ĉiu modlu virinon, tian, kiu plaĉus al ĉiu el vi, sed ne forgesu aldoni en la paston pecon da sukero de ĉi tiu telereto, por ke la vivo kun la edzino estu dolĉa, kaj por mi restos nur enspiri vivon en viajn kreaĵojn.
Kiam ĉiuj dek virinoj estis jam pretaj, Dio rigardis la telereton kaj kolere diris:
- Ĉi tie estis dek unu pecoj da sukero. Do unu el vi fripone enmetis du pecojn. Kiu tion faris?

Adamoj silentis. Tiam Dio prenis iliajn edzinojn, kaj, enspirinte en ĉiun la vivojn, disdonis al Adamoj ne tiun, kiun ĉiu modlis, sed ajnan, sen la elekto.
Ekde tiam naŭ viroj el dek pensas, ke fremda edzino estas pli dolĉa ol lia, ĉar en ŝi estas aldona peco da sukero... Kaj nur unu el tiuj Adamoj sciis ĝuste, ke ĉiuj virinoj estas la samaj, ĉar tiun superfluan pecon da sukero li simple formanĝis...

## IOM DA POPOLAJ SAĜAĴOJ KAJ ŜERCOJ

Dume vi staras vizaĝe al via pasinto, vi staras postaĵe al via estonto. Turnu vin!

Feliĉo estas tiu stato, kiam oni amas vin nur pro tio, ke vi ekzistas, ne atentante tion, ke vi havas nenion...


Ĉu ŝtelisto?

- Paĉjo, kiun nomon havis la bopatrino de Adamo?
- Ne havis li bopatrinon... Li ja estis en Paradizo...

- Isaak, mi eksciis, ke vi edziĝis...
- Jes, kara, antaŭ tri semajnoj...
- Ĉu vi ankoraŭ akceptas la gratuloj?

Okazas ankaŭ tiel: la homo estas kaj bonedukita, kaj modesta, sed li tute ne scipovas paradmontri tion!


Edzino: Mi hieraŭ vekiĝis kaj rimarkis, ke vi forestas... Kie vi estis?
Edzo: Kaj kie vi vekiĝis?

- Jaĉjo, oni diras, ke vi estis en Novjorko. Ĉu vi havis problemon pri la angla?
- Mi – ne, sed la usonanoj – jes...

- Kiel vi tiel bone scipovas la jidan?
- En nia lernejo instruisto de la angla estis judo...

Interparolas du nejunaj judinoj.
- Mi pensas, kion mi kunprenu por ke mia apero sur plaĝo ĉiujn mirigu?
- Venu tien kun skiiloj...

**EKZAMENO PRI LOGIKO**



Studento (S) – Bonan tagon, sinjoro profesoro.
Profesoro (P) – Bonan tagon. Ĉu vi pretas por la ekzameno?
S – Ŝajne jes.
P - Bone, ni komencu. Imagu, flugas aviadilo, ŝarĝita de 500 brikoj. Unu briko elfalis. Kiom da brikoj restis?
S – Ho, tio estas simpla tasko – 499.
P – Bone. Ni daŭrigu: diru al mi, kiom da movoj bezonatas por meti ĝirafon en fridujon?
S – Tri: malfermi la fridujon, enmeti la ĝirafon kaj fermi la fridujon.
P – Bone. Kiom da movoj bezonatas por meti elefanton en fridujon?
S – Bezonatas kvar movoj: malfermi, elpreni la ĝirafon, enmeti la elefanton kaj fermi la fridujon.
P – Jes, bone. Ni daŭrigu. Leono, la reĝo de bestoj havas naskiĝtagon. Por la festeno venis ĉiuj bestoj, sed unu, tamen, mankis... Kiu mankis?
S – Elefanto – ĝi ja estis en la fridujo.
P - Jes, bone. Imagu ĝangalan riveron, plenan de malsataj krokodiloj. Al la rivero venis maljunulino, kiu bezonis atingi la kontraŭan bordon. Ŝi sukcesis pri tio – ŝi trairis la riveron. Kial tiel povis okazi?
S – Ŝi sukcesis, ĉar ĉiuj krokodiloj estas en la festeno ĉe Leono - reĝo de la bestoj.
P – Jes, bone... Tamen post eliro el la rivero la maljunulino mortis. Pro kio?
S – Verŝajne trairo de la rivero estis tre malfacila por la maljunulino kaj pro elĉerpiĝo de la fortoj ŝi mortis.
P – Nu jen... Vi tamen malsukcesis en la ekzameno! Ŝi mortis pro la briko, elfalinta el la aviadilo, kiu trafis ŝian kapon... Venu sekvajare.

### *LA ADIAŬAJ RIDETOJ*

Kiel diris iu saĝulo: kuraciloj pli efike helpas al tiuj, kiuj ilin vendas.

- Bonan vesperon! Mi estas via nova najbarino, mi venis pormomente demandi, ĉu mi povas prunti de vi iom da salo?
- Bonan vesperon! Jes, certe... Eniru, senvestiĝu, tuj ni kune serĉos ĝin...

## LETERO DE LA LEGANTO

Mi gratulas kaj kore dankas la redaktostabon de “ISRAELA ESPERANTISTO” pro la riĉa, bunta kaj atentokapta enhavo de la duobla numero de 2023. Mi trovis en ĝi interesajn kaj pensigajn rakontojn kaj artikolojn. Kelkajn spritajn humuraĵojn mi kundividis kun mia familio, kiu ege ĝuis ilin. Mi ĝojis revidi en la revuo kelkajn artecajn fotojn pri la Israela Kongreso, kiujn mi povis montri al mia nepo, provante eventuale stimuli lian scivolon pri la agadoj de la Movado.

Amike, Luiza CAROL

*NDLR. Dankon, kara Luiza, pro via aprezo de nia laboro.*







**Pri la 24-a ISRAELA KONGRESO DE ESPERANTO:**
**ĝi okazos la 11-14 de aprilo 2024**
**en Jerusalemo!**
**La kostoj: la baza prezo por eksterlandanoj – tri noktoj en dulita ĉambro inkl. mantenmanĝon kaj programon – estas 200 EUR por persono.**
**Estas planata antaŭ- aŭ post-kongresa ekskurso.**
**Pliajn detalojn, prezkategoriojn kaj aliĝilon**
**bonvolu trovi en la retejo de ELI:**
**http://esperanto.org.il/ik.html**